**Vesperta seksumado**

Kiel ĉiuj el la vespertospecioj hejmaj en Germanujo, ankaŭ la granda 'musorela' vesperto *Myotis myotis* troviĝas sur la ruĝa listo de la pro forpereo endanĝeritaj bestoj. Plej nova kompreno pri ilia seksumado eble povas helpi pli bone protekti tiun vespertspecion, raportas esplorteamo kun *Barbara PETRI* de la Munkena Universitato.*

La granda mus-orelulo havas strangan generadritmon. La femaloj produktas malfrue en aŭtuno fertilan ovon. Kvankam ili jam tiam sekskuniĝas, ofte kun multaj maskloj, nur post la dumvintra dormado okaziĝos la fekundiĝo de la ovoĉelo. Ĝis tiam la inaj vespertoj stokas la semomiksaĵon de la diversaj vespertomaskloj. Kiu fakte estos la patro aŭ, pli klare, kies semo venkos la fertiligan konkurson do decidiĝas nur kelkajn monatojn post la kopulaciado.

La maskloj ne partoprenas bredadon de la idoj. La femaloj kunigas sin - ofte en nombro de pluraj centoj - en 'akuŝejo', en kiu kunvivas neniu aŭ nur malmultaj maskloj. Tiuj ĝenerale loĝas sole aŭ malgrandgrupe en malpli grandaj ejoj. *Barbara PETRI* kaj kolegoj esploris la interrilaton de parenceco en musorela kolonio en la tegmento de preĝejo en *Au*, Bavario. Tie ĉiujare ĉirkaŭ 700 inaj vespertoj bredas kaj plenkreskigas siajn idojn. Nur 19 maskloj havas siajn kvartirojn en la Aŭa preĝejo.

Ekzameno de la hereda materialo (DNS) montris, ke tiuj 'hejmaj' maskloj produktis nur malmultajn idojn. Pli ol 80 elcentoj de la idaro devenis de fremdaj vespertpatroj, precipe el masklologejo en 16 kilometrojn fora vilaĝo. La Munkenaj biologoj tiras el tio la konkludon, ke por protektado de la vespertoj tute ne sufiĉas, doni al ili akuŝejan lokon. "Por sukcese konservadi la larĝan musorelan vesperton ni devas koncedi al la vespertmaskloj aldonajn eksterkoloniajn kvartirojn, ĉar tiuj estas preferataj por sekskuniĝo" laŭ *PETRI*. En Bavario tamen la kondiĉoj ne estas tre favoraj por *Myotis myotis*. Granda parto de la eblaj ejoj ne plu estas uzeblaj por vespertoj: multe da iam alireblaj tegmentaj trabaroj, preĝejaj turoj aŭ favoraj pajlejoj intertempe estas ĉirkaŭbaritaj per krado - fakte por eviti la enhejmiĝon kaj loĝadon de kolomboj.

*Fonto: *Molecular Ecology, Vol. 6 (1997) 235*



**Laŭreato 1997 pri la premio "Fantazia Scienco"**

Komence de 1997 d-ro *Bernard Heuvelmans* ricevis la *Gabriele-Peters*-premion "Fantazia Scienco". La solena transdono de la distingo okazis en la Zoologia Instituto kaj Muzeo de la Universitato de Hamburgo, Germanujo. La distingo estis donata al plej elstaraj esplorlaboroj interlige de arto kaj scienco. La laŭreato 1997 estis *Bernard Heuvelmans*, kiu doktoriĝis en zoologio kaj nuntempe vivas en Francujo. Li estas rigardata kiel la "*Brehm* pri la nekonata bestomondo" ('*Viva Bestomondo de Brehm*'). La okdekjarulo dediĉis siajn dumvivajn studojn al tiuj specioj, kies ekziston la scienco forte pridubas - ĉu kiel formortinta kaj ne plu rekonstruebla specio ĉu kiel fabla estaĵo. La firma esplorlaboro de *Heuvelmans* kaj lia ĝisfunda dokumentado de fontomaterialo kaj vid-atestantoj fakte kreis specialan branĉon de la zoologio, la kripto-zoologion. En la nuntempa granda forpereo de specioj estas ŝuldata al tiu fakbranĉo speciala danko pro tuta vico de surprizigaj malkovroj, kiuj egalgrade pliriĉigis la arton kaj sciencan esploradon. La laboron de d-ro *Heuvelmans* plej bone karakterizas la sekva anekdoto pri sepkapa hidro - tiam vere skandalo por la eruditoj en la fama 'Komerca kaj Hansa urbo' Hamburgo.

En printempo de la jaro 1735 la Sveda natursciencisto Karlo Lineo *(Carolus Linné)* trapasis dek tagojn en Hamburgo. Lia famkonata ĉeflaboraĵo *Systema naturae*, la scienca bazo pri ordigo de la planto- kaj bestospecioj, tiam estis preskaŭ tute kompletigita. La eruditoj de Hamburgo prezentis al la 28-jarulo kun orgojla fiero siajn parkojn, bibliotekojn, sciencajn kolektaĵojn. Fine ili volis fanfaroni ankaŭ pri la plej pompa luksaĵo en la urbo: la sepkapa hidro. La Hamburga komercisto s-ro *Natorp* estis aĉetinta tiun sciencan sensaciaĵon dek-kvin jarojn antaŭe kontraŭ pluraj miloj da "regnaj taleroj". La juna Svedo senmetafore elbuŝigis kion li pensis pri tiu mirindaĵo - nome nenion. Sep kapoj de musteloj elstaris el korpo de grandega serpento, kelkaj kilogramoj da segpolvoro kaj lignera defalaĵo donis al la monstro firman staturon. Laŭ Lineo tiu falsaĵo ne valoris eĉ cent talerojn. Sed s-ro *Natorp* jam estis lombardinta sian raraĵon per dek mil taleroj! Tial li volis aperigi la Svedan scienciston antaŭ Hamburga tribunalo.

Lineo sekvis la konsilon de justicklerulo kaj forlasis la urbon tuj en la sama nokto.

*R. Sachs*